

Hans Christian Andersen,
En la arbaro

tradukita de Søren Kristian Nielsen

Ho, kiel bela la arbar',
kuk-kuk, kuk-kuk, falera,
kun bela varda foliar',
kuk-kuk, kuk-kuk, falera.
La junular' kun am-ebri'
promenas ofte tie ĉi.
::Kuk-kuk, kuk-kuk, falera.::

En luna brilo iras ni,
kuk-kuk, kuk-kuk, falera,
kaj ankaŭ sub la sunradi',
kuk-kuk, kuk-kuk, falera.
De la kukol' ekscias vi,
ĉu pli da kisoj havos vi.
::Kuk-kuk, kuk-kuk, falera.::

Nur pensu pri gajec' kaj ĝoj',
kuk-kuk, kuk-kuk, falera,
kaj iru laŭ la hela voj',
kuk-kuk, kuk-kuk, falera.
Kaj la kukolo kantas pri
la amo inter li kaj ŝi.
::Kuk-kuk, kuk-kuk, falera.::

*Traduko de la Dana poemo "I skoven" de HANS CHRISTIAN ANDERSEN (Johano Kristiano Andersen', *1805-04-02 - †1875-08-04) en Esperanton de SØREN KRISTIAN NIELSEN (*1905 - †1988-06-08).*

Arg-387-763 (2007-03-13 08:43:40)

La teksto estas prenita el la retejo http://www.ugle.dk/hvor_skoven_dog_er_frisk_og_stor.html de sinjoro Jørgen Ebert (je@ugle.dk). La kanto estas kantata laŭ la melodio de germana popola kanto. Vidu ankaŭ: www.ugle.dk/hvor_skoven_dog_er_frisk_og_stor.mid.